

MESOSEPT spofa

/trimekaino basica 0,95g, karbopendecinio bromata 0,14 g en 84 g de spreja miksaĵo/  
spray por priflego de la brulvundoj de la la kaj Iia grado, de malgrandaj supraĵaj vundoj, por  
loka sententigo de etaj supraĵaj kirurgaj priflegoj

A d j u s t o : prebotelo de 84 kaj 53 g. 16 set 17 - 0969/76

#### MEDICINISTAJ INFORMOJ

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj la ruĝkrucaĵoj.

E L D O N A S : Ĉeĥa Esperanto Asocio - medicina sekcio, Jilská 10, Praha 1, CSSR –  
kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto STARTO

REDAKTAS : MUDr Josef Hradil kun lingva konsilanto

MUDr Josef Černý. Grafika kunlaboranto: Jaroslav Klement, Karlovy Vary

KIAMANIERE ABONI AL NIA CIRKULERO :

BRITUJO : W. LAURIE, 1, FARRINOTON, 54, West Cliff Road,

Bournemouth HH 4 . 8BE, Britujo

FRANCUJO : MUDr YVETTE VIERNE, 5 RUE DOCTEUR HOUX, F 34

MONTPELLIER, Francujo

G D R : JURGEN HAMANN, PUCHAUER Str. N— 3, 705

LEIPZIG, GDR

HUNGARIO : MUDr EVA STANZ, RÁKOCZI u. 64 III/34, BUDAPEŠŤ,  
Hungario

BULGARIO : MUDr GEORGI POPOV, str. STAMBOLIJSKI 41, 9850

PRESLAV, Bulgario

JAPANIO : SABURO YAMAZOE, 371 MAEBASHI - SHI, IWAGAMI -

MACHI 4/8/9 GUNNA - KEN, Japanio

JUGOSLAVIO : MUDr PETER ZLATNAR, ŘÍMSKÁ 7, LJUBUANA -

Jugoslavio

POLLANDO : MUDr MARIAN LABA, SZY1.ÍAN0WSKIEG0 2/4, 75-546

KOSZALIN, Pollando

RUMANIO : MUDr GÁBOR LXZAR, str. STEFAN CEL MAŘE 26/A,

4055 COVASNA, Rumanio

USA : ESPERANTO, 3318 N. LAKE SHORE DRIVE, N— 801

CHICAGO, ILLINOIS, USA

USSR : IVAN PAIKIN, ŠVERNIKA 7, korp. 3, kv. 44,

117 449 MOSKVA V-449, USSR

MEDICINISTAJ INFORMOJ estas mendebila au Se perantoj au rekte

Se nia asocio por 7 rpk. Prezo Se perantoj estas 3,5 US dolaroj, egalvaloro en libroj au aliaj  
esperantaĵoj.

Ne sendu ĉekojn!

#### **AKTIVECO EL EKSTERLANDO:**

DE MEDICINA FAKKOMISIONO EN BUDAPEŠTO

En kadro de la 26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso la 26-an de junio kunvenis 17 membroj  
de la Medicina fakkomisiono de HEA. La ĉeestantoj reprezentis 2 Medicinajn fakgrupojn kaj  
venis el 8 urboj de Hungario. La kunsidon prezidis d-ro Imre Ferenczy, la eŭropa sekretario  
de Universala Esperanto Asocio Medicina.

Unue la prezidanto de la kunsido skizis la novan laborplanon de la fakkomisiono. La ĉefaj  
taskoj estas: altigi la mebronombrojn de la funkciantaj medicinaj fakgrupoj, orientigi la  
neesperantistajn medicinistojn pri la praktika uzebleco de Esperanto en internaciaj fakaj kon-

taktoj, komenci la preparadon de Esperanto-Hungara Medicina Fakvortaro, traduki fakajn artikolojn esperanten, organizi la unuan internacian konferencon de esperantistaj sanitaraj laboruloj, prepari la sekvantan Sciencan Vesperon de la Budapesta Medicina Esperanto-Fakgrupo.

Kvar ĉeestantoj alparolis. Katalin Farago konigis la brilajn sukcesojn de la plej forta hungara Medicina Fakgrupo en Hodmenovésárhely. Ili certigos estontjare en Mártély la lokon por kunveno kaj komuna feriumado de esperantistaj medicinistoj. En ilia Fakgrupo ankoraŭ mankas tiuj kadroj, kiuj kapablas verki esperantlingvajn fakajn artikolojn. D-ro Lajos Molnár disdoninte por la ĉeestantoj la 7-jaran historion de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo substrekis, ke la ĉefa celo de tiu ĉi malgranda sed eltenema Fakgrupo estas la apliko de Esperanto por sciencaj celoj. Fine d-rino Ilona Bikszádi kaj d-rino Gyuláné Polovita proponis la tujan fondiĝon de Fakterminara komisiono. La Kunsido decidis, ke la Fakterminara Komisiono komencos la preparadon de provizora "slipara" Medicina Fakvortaro sur malgrandaj trukartoj, kies kodon prilaboros, kaj la teknikajn aferojn aranĝos Katalin Farado, kaj la fakan gvidadon plenumos d-ro Lajos Molnár. Ni decidis krome, ke fine de aŭgusto de la jaro 1977 ni aranĝos en Mártély la unuan kunvenon kaj komunan feriumadon de hungaraj kaj eksterlandaj esperantistaj sanitaraj laboruloj, kaj kadre de tiu feriumado ni okazigos esperantlingvan fakprelegaerion.

La gvidantaro konsideris la kunsidon tre sukcesa, ĉar montriĝis antaŭsignoj de la nova periodo en la hungara sanitara Esperanto-movado.

#### Plenaj artefaritaj renoj en Ĉeĥoslovakio

En kadro de eksterordinara laborŝanĝo ekfunkciis la 3-an de aprilo 1976 en la interna sekcio de hospitalo en Praha-Střešovice (elparolu: Strešovice) unua ĉeĥoslovaka hemoliza aparato por unu lito. Post sukcesa klinika prova funkcio en dializa Centro en Hradec Králové (Hradec Králové), kie efektiviĝis 45 dializoj de klinikaj uremiuloj, estis la aparato kompletigita per pluaj elementoj en kadro de komuna socialisma devontiĝo de la IIIa interna sekcio de la Centra Milithospitalo kaj evolulaborejoj de ĈSTV en Prago honore al XVa kongreso de KPC. Hemodializa unuo, unua siaspeca en nordmoravia regiono estis malfermita en regiona Hospitalo kun Polikliniko en Ostrava-Zábřeh (Zabrjeh). La Centro havas ses artefaritajn renojn kun kotleta ekipo, ebligas finkuracon de pacientoj – perspektive - ankaŭ post retransplantoj. Ĝi estas lokigita en izolita parto de la interna sekcio. Tage ŝanĝiĝas sur la litoj 6 pacientoj dum du skipoj. La solenan malfermon de la Centro partoprenis krom altaj ankaŭ anstataŭanto de la ministro por sanaferoj de ĈSR MUDro B. Štípal (Stjipal).

#### **Kirurgia kuracado de strumo /Kliniĉeskaĵa medicina 56, Is 84-89, 1976/**

Estas menciita grupo da 3140 pacientoj kun diversaj malsaniĝoj de tiroida glando. Preskaŭ ĉe 90% el ili estis strumo. En la grupo da personoj kun tiu pligrandiĝo de tiroida glando alte prevalis virinoj. La pacientoj estis en la aĝo inter 7-82 j. Ĉe la plejparto da tiuj pacientoj temis pri toksa strumo. La diagnozo de pligrandigita tiroido ne estas ĉiam simpla afero. Ekstas eĉ diference-diagnozaj malfacilaĵoj, antaŭ ĉio kun malignaj tumoroj de la tiroido. El ĉiuj 2147 pacientoj kun toksa strumo 757 estis kuracataj per radioaktiva jodo, ĉe altaj estis efektiviĝita operacio. Postoperacia morteco estis malalta kaj faris nur 0,4%. Maksimo da pooperaciaj malfacilaĵoj kaj morte iniĝantaj kazoj apartenis al la komenca tempoperiodo de tiuj operaciaj kuracadoj. Ĉe pacientoj kun netoksa strumo mortis eĉ ne unu paciento. La tuteca postoperacia morteco faris do ĉe ĉiuj pacientoj 0,2%. Kuracado de tiuj pacientoj devas esti kompleksa, ĉar nur tiamaniere oni povas sekurigi senkomplikan postoperacian malsaniron. (DroC)

**Oblitera arteriosklerozo** de malsupraj ekstremaĵoj ĉe viroj 60-69 jaraj laŭ epidemiologia studo /IIa interna kliniko de medicina fakultato de Universitato de Karolo en Prago:

M. Suntychová, P. Doudík, teknika kunlaboro D. Márová.

Ĉe pliaguloj (ekde 60 jaroj supren) montriĝas la simptomatologio laŭ stadioj jenaj:

- I. stadio sen klinikaj simptomoj,
- II. stadio : kaŝita doloro, aperanta nur post ŝarĝo de certa grado, dumtempa lamiro,
- III. stadio : kun doloroj dum trankvilo kaj komenciĝantaj trofoperturboj,
- IV. stadio : karakterizata per gangrenoj. FONTAINE envicigas en la kvaran stadion ankaŭ malsanulojn kun oblitera arteriosklerozo de subaj ekstremaĵoj kaj kun samtempa trafiĝo de kor-cerbo-arterioj, ev. kun lezoj de cirkulareo mezenteria aŭ rena.

Oni esploris modelon de 263 viroj. Intertempan lamiradon (CLAUDICATIO

INTERMITTENS) oni diagnozie laŭ malpliigo aŭ malapero de pulsado sur arterioj, laŭ vazobruoj de pli grandaj arterioj, plue laŭ malpliigo ĝia malapero de osciladoj sur malsupraj ekstremaĵoj; ĉi kriteriojn plenumis 17 viroj.

Oni kontrolis jenajn influojn:

- a) o k u p o : sida au kun intensa moviĝo estas preskaŭ sensignifa, seninflua;
- b) o b e z o montriĝis esti preskaŭ seninflua. Pacientoj estas per ĝi indulgataj, kaj same en la literaturo oni ne trovis altajn informojn.
- c) plej malfavora estas influo de t a b a k o. Tri kvaronoj de fumantoj suferas pro intertempa lamirado, 29,4 % de ili devis esti operaciitaj, kelkaj unugambe, 3 ambaŭgambe. Plej ofte estis trafataj fumantoj longjaraj aŭ fortaj, t.e. pli ol 15 cigaredojn ev. samegalan parton (pordojn) da tabako.
- d) koncerne metabolismojn de glicidoj kaj lipidoj: la konkludoj ne estas ankoraŭ definitive klaraj.

Koncerne kordiaĉeton oni ĝis nun trovis nek prevalo nek incidence eĉ unu klaran sukermalsanon, nek pli densan rilaton inter ĥolesterolemio kaj periferia oblitero, ĉe sukermalsano oni konstatis duoble pli grandan (t.e.oftan) aperon de arteria oblitero ol ĉe nediabetuloj, kaj oni eĉ 4-oble pli ofte devis amputi ol ĉe nediabetuloj.

Trigliceridoj kaj fosfolipidoj ĝis nun ne estis trovitaj decidoj. Kelkaj aliaj aŭtoroj (NEWWALL, BLISS, KIRK: Angiology 23,1972,2,69-75) konstatis ĉe periferia oblitero en 60 % de malsanuloj leviĝon de sangolipidoj (kaj ĥolesterolo kaj trigliceridoj). (Dro C)

**Lezo de koro** ĉe alkoholdevena hepatocirozo Limas C. J. kaj kunlaborantoj, Circulatlon 49, 1974, 4, 755-760.

Ĝi manifestiĝas per malboniĝo de aktiveco de maldekstra ventriklo. Post infuzo de ANGIOTENSINO la laboro de la koro ne pliiĝas, sed leviĝas sistema vazara rezisto kaj tensio en la pulmarterio. Post enigo de OUABAINO la cirkulado ne pliboniĝas, kio pruvas malgrandan efikon ankaŭ de digitalaj preparaĵoj ankaŭ en ĉi tiuj kazoj. Ĉi tiuj indikoj atestas konstantan dampiĝon de korefektiveco ĉe alkohola cirozo, dampiĝo, kiu plejparte ne manifestigas klinike pro samtempa malleviĝo de sistema vazara rezisto - tipa cirkulŝanĝo ŝe la cirozomalsaniĝo (Dro C)

**Pligrandiĝo de la koro post travivita korinfarkto** Laŭ Vnitřní lékařství, 1976, II-I, p. 57.

Ĝi estas en rekta dependo de grado de korpliigo de maldekstra ventriklo ligita kun lezoj de koraktivece maldekstra kaj ofta kun stagna kormalfunkcio. Malgraŭ malfacilaĵoj de la metodo por konstato de korpligrandiĝo per komparado de korgrando kun granda de torako kaj de la metodo por konstato de korvolumeno atingis B. J. FIELD kaj kunlaborantoj jenajn konkludojn (CIRKULATION 50,1974,No2,331-339): Reciprokaj rilatoj inter ejektaj frakcioj kaj korgrando ne estas prava kaj korgrandeco estas pli bona indikilo pri aktiveco de maldekstra ventriklo ĉe korinfarkto ol esploro de ejektaj trakcioj. Normala korgrandeco ne ekskluzivas malpliigon aŭ lezitan aktivecon de maldekstra ventriklo, kiu kompreneble ofte ne manifestiĝas klinike. Ĉe normala korgrandeco post infarkto estis la aktiveco de maldekstra

ventriklo intarkta, dum ĉe korpligrandiĝo okazaa perturbo de korfunkcio de maldekstra koro post infarkto en ĉiuj kazoj. (DroC)

### **SKRIBAS NIAJ LEGANTOJ**

"Instigita per via reala klopodo plibonigi nian esperantan bultenon de sanitaristoj mi dezirus ĉi maniere bondeziri al via kolektivo okaze la lasta numero (2/76, rimarko de la redaktoro). Ĝi estas tre bela per sia grafika aranĝo. Nur mi havas unu peton. La enhavo de artikoloj estas ankoraŭ tro dokta kaj mi opinias, ke unue ĝi ne rilatas al plejparto da legantoj, kaj due ke plejparto da legantoj la menciitaj teoriaĵojn ne komprenas. Tial mi rekomendas elekti plejparton da ili el amplekso de praktika medicino kaj traduki tre bonajn sciigojn el la mondo - el la gazeto Zdraví (Saneco). Ne Skribu ilin pli longajn ol en la lasta numero. "Dro Riedl, Hradec Králové.

Respondo de la redaktoro: Koran dankon por via kaj bondeziro kaj kritiko. Vere elekto de artikoloj, kiuj povus interesi plejparton da legantoj, estas tre malfacile. Kaj mi opiniis, ke ni vere elektis nur plej simplajn sciigojn de resuma karaktero. Parte dependas la elekto de artikoloj de kontribuantoj. Sed nian klopodon pri simpleco kaj kompreneco de niaj artikoloj en estonteco ni ankoraŭ pli intensigos. Kia estas via opinio, niaj legantoj?

### **HUMORAĴOJ**

"Pro kio mortis viaj gepatroj?"

"Mi jam ne rememorigas, sinjoro doktoro, sed ĝi certe ne estis io grava."

Aĝo decidas: „Nia filo, sinjoro doktoro, faras babuetojn sur la sablo. Ĉu estas tio normala?"

„Kompreneble, tion ja infanoj faras, tio estas elmonro de kreaĵ impulsoj."

„Nu, vi vidas, sinjoro doktoro, kaj la bofilino volas kun li disedziĝi..."

Ĉe dentkuracisto

"Sinjoro doktoro, ĝi estas tro multe, ĝi estas tro multe. Vi ja postulas trifoje pli multe ol aliam." - "Nu, nu, Mr Smith. Vi ja tiom kriis, ke du aliaj pacientoj forkuris."

En la atendejo de kuracista konsultejo sidas du pripensantaj viroj.

„Vi, aŭdu," diras la unua el ili. „Ĉu la bovo povas havi la komplekson de senvaloriĝo?"

„Mi ne scias;" la dua respondas, "Ĉu vi ion sentas?"

La profesoro ekzamenas kandidaton de medicino.

„Kio provokas ŝvitadon?" sonas unu el liaj demandoj.

„Ekzemple viaj demandoj, sinjoro profesoro.

Sinjoro Akvoro jam kuŝas sur operacia tablo.

Subite kliniĝas super li la kirurgo kun masko sur sia vizaĝo. Sinjoro Akvoro ekridegas.

„Kial vi idiotas, sinjoro doktoro, deprenu tiun maskon, mi ja egale bone ekkonis vin!"

„Via filo balbutas, ĉu ne?"

„Jes ... sed nur malmulte, sinjoro doktoro. Nur se li parolas."

### **REZULTOJ DE LA ESPLORO EN LA KVINA KVINJARPLANO**

Prof. MUD-ro J. Houštek DrSc, MUD-ro L. Pelech CSc, Universitato de Karolo en Prago.

La sekcia plano de la esploro far de ministerloj por sanaferoj kaj lernejaferoj de ĈSR por la jaroj 1971-75 estis kunmetita surbaze de spertoj pri plifruaj planoj kaj kun respekto al atingitaj rezultoj. Ĝi apogis sin sur funkcioj de ĉefaj sekciaj komisionoj kaj ĝia kunlaboro kun unuopaj sekcioj kaj socioj de Ĉeĥoslovaka socio je la nomo de J.E.Purkyně esp.Purkinje). La

komitatoj de tiuj socioj proklamis poste sian opinion rilate tiujn planojn kaj plus partoprenis traيران taksadon eĉ de oponentadoj de la finitaj partaj taskoj. La plano por la jaroj 1971-75, kiun sammezure partoprenis la ministerio por sanaferoj de ĈSR kaj kuracistaj fakultatoj inkluzive la fakultadon farmacian, alligis sin al Stata plano de baza esploro, nome al ĝia Vila programo de "biologiaj kaj medicinaj bazoj de la sana evoluo de la homo."

La rezultoj de la sekcia plano estis pritraktitaj dum kunveno de la scienca konsilantaro de la ministerio por sanaferoj de ĈSH dum la tagoj 16.-18a de marto 1976, kie la gvidantoj de unuopaj sekcioj raportis pri tio, kion ilia sekla esploro alportis.

Okazis unuan fojon, ke la tuta kvinjara piano estis tiamaniere taksata komplekse.

En la sekva trarigardo ni mencias kelkajn elektitajn rezultojn, kiuj havas signifon por diagnozo, kuracado kaj prevenco en nia sanscienco. La sinsekvo de la ĉefaj sekciaj komisionoj respondas al ilia enviciĝo en la sekla piano por la kvinjara tempoperiodo. En parentezoj post la nomo de tiu komisiono estas menciita la nomo de ĝia prezidanto kaj la nomo de la respektiva laborejo, kiuj povas liveri pluajn informojn pli detalajn (precizan adreson sciigos al interesuloj la redaktoro de tiu ĉi bulteno).

Fiziologio kaj patologia fiziologio (doc. S. Trojan, FVL UK Prago) - estis gajnitaj valoraj konoj dum studo de enzimaj ŝanĝoj, ĉe eksperimenta Porfirio provokita per grizeofulvino; kun praktika uzo precipe en la areo de resuscito oni kalkulas precipe ĉe la konoj, gajnitaj dum studo de oksidiga metabolismo kaj strukturo de cerbo dum longtempa iskemio.

Morfologio kaj patologio Prof. D-rino Benešová, FDL UK Prago): - estis ellaborita originale klasifiko de ovariaj tumoroj kaj normiga klasifiko de trofoblastoj. Estis gajnitaj originaloj konoj dum studo de etiologio kaj patogenezo de sarkoidozo. Al plibonigo de lo diagnozado en praktiko kontribuis la novaj metodoj de enzima citologio. Estis ellaborita nova propono de klasifiko de transpozicioj de grandaj angioj kaj gajnitaj novaj konoj, gravaj por tiuflanka kirurgia prevenco post implanto de artefarita korvalvulo. Estis pruvita ofta apero de peptika ulcero ĉe personoj super 65 jj, kiu estas klinike muta kaj manifestiĝas nur per komplikajoj.

Kuracista genetiko (doc. Černý, KUNZ Prago) - gajnitaj konoj ebligas praktikajn aranĝojn por plibonigo de antaŭnaska diagnozado de kromozomaj devioj; praktikaj konkludojn alportis ankaŭ la studo en la areo de ennaska koxa elartikiĝo.

Farmakologlo prof. Květina, la farmaca industrio estis transdonitaj produkinstrukcioj pri la tuta vico da novaj medikamentoj, aŭ novaj formoj por uzo (ANTILIZINO, ĤLORTHALIDONO, DIRONILO, DIAZEPAMO en injektiloj. THIAMCINOLONo unĝento, multkomponentaj inzulinoj, diversaj tipoj de dekstrano k.a.)

Sur la kampo de „ekonomiigo de indeksoj de kvalito de kuraciloj kaj esploriloj" estas la plej grava propono de divida sistemo por ĥromatografa diferenciĝo de kelkaj vitaminoj en kuraciloj kaj diazepinaj derivaĵoj; per revizio de samtempa farmakopeo estis kreita bazo por kreado de farmakopeo nova.

Kuracista imunologio (doc. J. Johanovský, USOL Prago) - ellaboro kaj enkonduko en la praktikon de nedirekta inhibicio de migro plibonigis diagnozon de kelkaj aŭtoimunaj malsanoj, diferencigon de stadio de intenseco de la malsano kaj alcelan direktigon de imunosupresiva terapio; plue estis mapitaj niveloj de imunoglobulinoj ĉe sanaj personoj de diversaj aĝaj grupoj, nome klel ĉe sanaj tiel ĉe diversaj patologiaj statoj.

Kuracista kibernetiko (Dro Z. Wunsch, FVL UK Prago) - estis atingitaj pozitivaj rezultoj dum solvado de farmacie informa sistemo en higiena servo; estis ellaborita aro da standartaj manieroj de notado de informoj por la tuta vico da klinikaj sekcioj, ebliganta pluan automatan prilaboron da informoj. Por rutina uzado estis transdonita ankaŭ metodo pri taksado de radioimunologiaj analizoj pere de kalkulmasino.

Pediatrio: (prof. Houštek, FVL UK Prago) - esploro temanta pri kuracado de novnaskintaj ikteroj per ultraviola lumo estis kronita per konstruo de terapia radiilo, kiu havas rimarkindan efikecon, estas patentota kaj fabrikota; esploro de patogenezo de encefalitoj kaj encefalopatioj

dum traŭro de infanaj infektoj kaj post vakcinado klarigis la aŭtoimunajn mekanismojn kaj kontribuis al profundiĝo de diagnozado kaj terapio. Plue estis pruvita la signifo de frutempa rehabilito de infanoj difektitaj dum naska tempoperiodo. La nove konstruita enterobiotika sondo ebligis starigi principojn de prava prognozo kaj terapio de malabsorba sindromo. Laŭ preventiva vidpunkto estas grava konstato, ke la homaj limfocitoj povas esti difektitaj jam per malaltaj dozoj de rtg-radiado, uzataj ekzemple dum eliga urografio. Por praktiko estas grava pruvo, ke la infanoj, kiuj suferis en Ig plej frua ago pro ripetigantaj malsanoj de supraj spirvojoj, montras tion pli malfrue per granda procento da difektoj de pulmaj funkcioj.

Gimnastika medicino (prof. Máček, FDL UKPrago: estis gajnita tuta vico da pozitivaj konaĵoj dum studado de metabolaj sekvoj de adapto rilate diversan tipon de priŝarĝo dum traŭro de ontogenezo. Estis pruvita kapableco de infana organismo bone adaptiĝi rilate priŝarĝon de longtempa karaktero, kio aangla ĝisnunajn imagojn pri identeco de diversaj specoj de gimnastikado ĉe infanoj; pluaj gajnitaj konoj signifas gravan kontribuon por elekto de infanoj en sportaj klasoj kaj por organizo de trejnado en diversaj sportaj sekcioj, kaj por atendata plialtigo de korpa kapablo ĉe normala populacio.

Kardiologio (prof. Reiniš, FVL UK Prago: estis pruvite, ke aterigaj procedoj en muroj de arterioj, difektitaj per aterosklerozo, malrapidigas, dum kio permeabileco de arterioj por malpropra albumino altiĝas. Epidemiologia esploro de iskemia malsano kora ĉe Industria populacio montris, ke la ĉefa riska faktoro estas kombinaĵo de difektoj metabolnutra kaj hipertensio. Al diagnozo de vejna kaj arteria trombozo kontribuis radioizotope metodo helpe de markita fibrinogeno I125. Estis ellaborita kaj klinike verifita metodo de transepta katetrizo de maldekstra korkamero tra subklavia vejno. Selektiva korkronorafio estiĝis konstanta parto de antaŭoperacia esploro ĉe kazoj, kie oni decidiĝas pri kirurgia implanto de vejnaj aortokoronariaj greftoj. Estis konstatite, ke latentan formon de iskemia kormalsano eblas diagnozi ankaŭ per neinvazivaj metodoj, kia estas EKG-kurbo dum pri larĝa ergometrio kaj poligrafia surpaperigo de korfunkcio el areo de la korpinto kaj pulso de karotido post dozita laboro. Gastroenterologio (prof. Z. Korecký, LF UP Olomouc): Ĉe malsanulo kun peptika ulkuso en stomako estis konstatitaj karakterizaj ŝanĝoj de la spektro de aminoacidoj. Signifa kontribuo en novaj esploraj metodoj estas diagnozado de tumoroj de gastrointestina organaro per mezurado de impedanco de la histo – estis evoluita nova instrumento, kiu estas patentita kaj preparita por fabrika produktado. Estis patentita nova produktmaniero de delaktosita lakto. Estis evoluita kaj en produkto enkondukita malaltalbumine sen GLUTENA pano.

Nefrologio (doc. O. Schuck, IKEM Prago): Estis pruvita la signifo de subvezikaj obstruktoj pri la ekesto kaj disvolvo de daŭraj aŭ recidivantaj infektoj de malsupraj urinaj vojoj kaj pri evoluo de vezikorena reflukso. Estis pruvitaj signifaj diferencoj ĉe efikado de diureziloj je eligo de kalelo kaj magnezio; ĉe personoj regule dializataj estis konstatite, ke la fizika kapableco de pacientoj restas bona ĉe 80% da observitaj personoj, kiuj denove ekokupigis aŭ far la pretendemajn hejmlaborojn. Hepatologio (prof. Hořejší, UHKT Prago): Ellaboritaj rapidaj skringaj testoj por pruvo de aktiveco de transaminazoj kaj por malkovro de HBAg akiradas vastan uzon en prevenco de hepatito B, precipe en transfuza uzo. Estis ellaborita tre detale morfologia diagnozado de hematomglandoj. Estis kreitaj kondiĉoj por preparo de speciala IgG, uzata por preventaj celoj.

Endokrinologio (Dro Felt, VUE Prago): Estis konstatite, ke tireoidaj hormonoj rapidigas desaturigon kaj elongon de grasaj acidoj ĉe la homo, kio estas grava el vidpunkto de aterogenezo. Estis ellaborita metodo pri kuracado de hormona eksaoftalmo per sukcesiva kombinaĵo de azathioprino kaj prednizono kun uzo de kontrolaj esploroj de imunoglobinoj IgG, IgM kaj IgA. Por praktiko estas grave limigi enspezon de kalcio mallongtempe antaŭ la nasko, eliranta el konstato de inversa rilato inter kalcio kaj citrona acido ĉe la feto. En la

kuracan praktikon estis enkondukita tipo de Neutral-zink-inzulino kaj en produkton estis transdonita ĉeĥoslovaka menokompleta insulino.

Seksuologio (prof.Hynie.FVL UK ragoT: Estis konstatitaj kelkaj kaŭzoj de vira aterileco kaj proponitaj ebloj de ĝia kuracado.

Hematologio (prof.Libanský, utiKT Prago): Estis gajnitaj originalaj konoj pri nukleoloj de limfocitoj, pri ilia morfologio dum patologaj kaj normalaj statoj. Oni sukcesis izoli el la veneno de ECHIS CAHINATUS enzimon ekarionon, specialan proteazon, kies uzon oni supozas dum kuracado de trombozo. Estis ellaborita originala metodo por konstato de tria disketa faktoro. En praktikon estis transgviditaj novaj efikaj manieroj de ĥemoterapio de hemoblastozoj. Estis observata efikeco kaj ekonomio de ĥematoterapio en praktiko kaj provita konservado ev. magazenedo desangdisketoj per frostigo.

Dermatologio kaj venerologio estis evoluita nova tipo de analizaparato por observo de perspiro, nova kvinkanala termistora termomezurilo kaj detektoro por haŭta reometrio, kio bonigis eblon de esploro de la haŭtfunkcioj. Estis plibonigita kuracmetodo de psorazio per ultraviola radiigo kaj de kuracado de akno vulgara per vakcinoj; observado de la plej oftaj alergenaj en gumaj produktoj kaj artefaritaj nutraĵaj kaj furaĵaj miksaĵoj rekte influis la teknologion de la produktado kaj prevencon de profesiaj dermatozoj. En la epidemiologio de gonoreo estis uzita originale aerotipa procedo.

Alergologio (dro. V. Špičák, FDL UK Prago): Estis analizita la rolo de akaroj en hejma polvo. La efiko kres bazon por diagnozo, kuracado kaj produkto de la unuaj ĉeĥoslovakaj specialaj alergenaj; estis pruvite, ke la kaŭzo de nealergiaj reagoj post enmuskola apliko de depotaĵ penicilinoj estas penetro de materiaj suspensioj en vejnajn cirkuladon kaj emboligado de kristaloj en pulmon. Gravan rolon ludas la superflua premo, per kiu estas la dozo injekciita kaj ekestas ŝanĝoj post antaŭiraj injektoj.

Neurologio (doc B.Roth, FDL UK Prago): Konstato, gajnita per matematika analizo de EEG kurbo de epilepsio estas signifa por konstato de kuracefiko kaj prognozo; ĉe komencaj aŭ manifestiĝintaj daŭraj venenigoj per la solvaĵoj estis konstatitaj perturboj, kiuj ludas gravan rolon dum frutempa diagnozo kaj prevenos de industriaj venenigoj per solvaĵoj. Painlatrio (dro C.Skoda, VUP

Prago): estis ellaborita tute originala metodo de la aŭtomata pritakso de ŝanĝoj dum disponigata flegado kaj laborstatuto por kohorto da malsanuloj. Estis gajnita vico da originalaj konoj pri influo de litio je kelkaj metabolaj procedoj kaj pri rolo de la celo kaj medolo de superreno en metabolismo de litio en la organismo. (Daŭrigota.)

## SOMERA E-TENDARO LANCOV

Sano, ĝojo bela naturo, amikeco inter la popoloj, tio estas simptomoj de la eminenta esperantista tendaro ĉe "Arĝenta golfo. Estontjare ĝi okazos jam po 25 foje. Tiu ĉi jare partoprenis pli ol 300 da infanoj eĉ maturaj gelernantoj el pli ol 8 landoj.

Eĉ vi havas eblecon vidi kaj travivi tendaron, eĉ gajni premion por plejbela masko dum tendara karnavalo, aŭ esti elektita kiel „plej bela“, „plej simpata" dum la 14 taga tendaro, se vi jam nun aliĝos.

Skribu al nia asocia adreso. Fremdlandanoj povos pagi per landaj bankoj rekte.

Kuracistoj, kiuj volos servi en SET restados senpage.

Antilysin spofa – inhibitoro de proteazoj, efika – ĉe hiperfibrinolitika sangumado (en kirurgio, urologio, ginekologio kaj akuŝologio)

- ĉe akuta pankreatito kaj en prevento de prosoperaciaj pankreatitoj

- ĉe kronikaj artikitoj

Adjusto: 5 ampuloj 10 ml po 10 000 TIU

30 sublangaj tablojdoj po 10 000 TIU

MESOSEPT spofa

/trimekaino basica 0,95g, karbopendecinio bromata 0,14 g

en 84 g de spreja miksaĵo/ spray

por priflego de la brulvundoj de la Ia kaj IIa grado,

ĉe malgrandaj supraĵaj vundoj, por loka sensentigo ĉe etaj supraĵaj kirurgaj priflegoj

A d j u s t o : prembotelo de 84 kaj 53 g.

Sĉt 17 - 0969/76